

LA FIDO KAJ LA MONUJO

(Mk. 5,20. 6, 19-34)

Artikolo publikigita en NIGRIZIA n. 3/2011

Kiuj estas la kriterioj por kontroli la fidon, por scii ĉu oni estas kredanto aŭ ne? Laŭ multaj homoj la juĝkriterioj rilatas la religian praktikadon. Sed tiuj estas kriterioj malmulte objektivaj. Kiel oni povas mezuri la kvanton de fido ĉe iu homo laŭ lia partopreno en la liturgiaĵoj aŭ laŭ liaj devotaĵoj?

En la Eklezio oni ĉiam unuanime indikis kiel fundamenton de la fido ĉe la kredanto la resurekton de Jesuo, ĉar, “Se Kristo ne releviĝis, vana ja estas nia predikado, vana ankaŭ estas via fido” (1 Kor. 15,14).

Sed atesti la fidon en la resurekto de la Kristo estas malfacilega afero. Kiel eblas esti la garantianto pri realaĵo kiu ne povas esti klarigita? Tamen, en La Agoj de la Apostoloj oni legas ke la atesto pri la resurekto de Kristo ŝuldiĝas al realo kiun ĉiuj povas tuŝi permane, kaj kiu ne bezonas riskoplenajn teologiajn akrobataĵojn aŭ intelektajn perfortojn: “kun granda potenco la apostoloj atestis pri la releviĝo de la Sinjoro Jesuo... Inter ili neniu havis mankon...” (Agoj 4,34). La pruvo ke la Kristo ne nur resurektis, sed li vivas kaj agas ene de sia komunumo, estas ke neniu el la komunumanoj havas mankon, ĉar ĉiu el ili sin sentas respondeca ne nur pri la bono, sed eĉ pri la bonfarto de la frato. Komunumo kie neniu havas mankon, kie ne ekzistas kreditoroj kaj ŝuldantoj, estas la klara pruvo ke en ĝi ekzistas io aparta: la viva kaj vivdona ĉeesto de la Sinjoro.

La indikilo de onia fido estas la monujo. Certe ne pro tio, kion ĝi entenas, sed pro tio, kion ĝi kapablas donaci. Havi fidon signifas fidi je la Patro tiom ke oni ne plu prizorgas siajn bezonojn, kaj estas libera prizorgi la bezonojn de la fratoj, estante certa ke en la momento de la bezono la Patro prizorgos en pli abunda maniero ol tiu kiun oni povas deziri, ĉar la Sinjoro donacas vivon al tiu kiu komunikas vivon, kaj kun la malavarulo la Patro estos abunde malavara (Mt. 10,8; Lk.6,38).

Sed la instruo de Jesuo rilate la gravecon igi nian vivon mem malavara donaco, kundividante ne nur kiu ni estas, sed ankaŭ kion ni havas, ĝuste tio ŝajnas esti malobservata de tiuj kiuj pretendas esti liaj sekvantoj. Pro tio Jesuo admonas ke “Neniu povas esti sklavo por du sinjoroj.. oni ne povas servi al Dio kaj al Mamono” (Mt.6,24). Sed plurfoje estas ĝuste la piuloj kiuj sukcesas servi al Dio kaj al sia profito (Lk. 16,4), sukcesante uzi Dion por sia propra gajno, kiel faras la skribistoj kiujn Jesuo denuncas kiel tiujn kiuj pretekste ke ili preĝas, “ili formangas la domojn de vidvinoj” (Mk.12,40).

Jesuo estas tre klara: la fidon je la Patro oni ne vidas el dogmecaj atestoj pri fideleco al doktrino, kaj eĉ ne el respekto de la religiaj reguloj, sed oni ĝin vidas el la kapablo esti malavara kaj donaci sen agi pro egoismaj konsideroj.

Kiuj akumulas riĉaĵojn, kiuj spekuladas, kiuj agas surbaze de sia avantaĝo, tiuj ĉi ne kredas je Dio, sed ili kredas sian rivalon, nome mamonon (aramea vorto kiu

indikas la havaĵon, kaj kiu transprenis la signifon de riĉaĵo kiel bazo de la homa sekureco). La instinkto de memkonservo faras tiel ke la homo pripensu sekurigi sian ekziston pere de la amasigo de riĉaĵoj. Sed Jesuo admonas siajn sekvantojn ke la avido pri posedaĵo anstataŭ alporti ĝojon kaŭzas angoron, neelĉerpeblan fonton de maltrankvilo kiu voras la animon de la homo, tiel kiel la tineoj kaj la rusto foruzas la amasigitajn riĉaĵojn. Fakte, la riĉaĵo estas nelogike faktoro je malkvieto, kaj ĉar ĝi neniam ŝajnas sufiĉi, kaj ĉar oni timas ĝian malaltiĝon kaj ĝian perdon (la tineoj, la rusto kaj la ŝtelistoj kiuj hodiaŭ minacas la havon nomiĝas inflacio, bankoj, borso). Kaj ĉiukaze, eĉ se homo sukcesas amasigi kaj konservi ĉion kion li sukcesis akumuli, al kio tio utilis? Jesuo admonas: “al kio utilis gajni la tutan mondon” kaj poste perdi sin mem? (Mt. 16,26; Lk.12,20). Laŭ Jesuo la valoro de la homo kuŝas en lia malavareco: “La lampo de la korpo estas la okulo; se do via okulo estas sendifekta, via tuta korpo estos luma. Sed se via okulo estas malbona, via tuta korpo estos malluma” (Mt. 6,22-23). En la tiutempa lingvaĵo la klara okulo indikis la malavarecon de la homo kontraŭmetita al la malluma okulo kiel bildo de ties avareco (Read. 15,9; Mt. 20,15). En la rilato kiun li havas al la mono rolas la vivon de la homo: la malavareco, kiu esprimiĝas pere de la kundivido, kondukas la homon tiel ke li estu lumo, la egoismo kiu manifestiĝas pere de la avareco kondukas lin tiel ke li estu mallumo.

Jesuo donas multe da graveco al la kapablo de la homo esti malavara, ĉar el tiu sinteno dependas lia feliĉo aŭ lia malfeliĉo, lia sukceso aŭ lia fiasko. Por ke tio estu bone komprenata, Jesuo ĝin instruas per argumentoj kiuj estas alireblaj al ĉiuj: “Rigardu la birdojn de la ĉielo, ke ili ne semas, nek rikoltas, nek kolektas en grenejojn, kaj via Patro ĉiela ilin nutras” (Mt. 6,26). El ĉiuj bestoj kiuj en la Talmudo estis benataj de la homoj, la birdoj estis ekskludataj, ĉar ili estis taksataj kiel sensignifaj krom malutilaj. Tamen Jesuo deklaras ke eĉ la neglektindaj elementoj de la kreitaĵo estas prizorgaĵoj de la Kreinto, kiu amas la vivon. La alian ekzemplon Jesuo ĉerpas el la beleco de la “lilioj de la kampo” kaj li eĉ aŭdacas deklari ke eĉ ne la ambicia reĝo Salomono, en sia tuta gloro “estis ornamita, kiel unu el ĉi tiuj”. (Mt. 6,28-30).

La certigo de Jesuo ke la Patro prizorgas la birdojn kiuj ne semas, nek rikoltas, nek kolektas en grenejojn (Mt. 6,26) kaj la florojn, kiuj “ne laboras, nek ŝpinas” (Mt. 6,28), ne estas invito al fatalismo kaj al neaktiveco, sed ĝi estas invito al la fido je la providenca agado de la Sinjoro, kiu estos eĉ tiom pli efika por la homoj, kiuj semas kaj rikoltas, ŝpinas kaj laboras. Jesuo ne invitas ne sin okupi, sed li invitas ne trozorgi. Estas tio kio por Jesuo diferencigas la kredanton de la paganulo. Kiuj ĉiam estas angorplenaj pri sia vivo (Kion ni manĝu? Kion ni trinku?) kaj kiuj serĉas en la akumulo de la havaĵoj la respondon al ilia maltrankvilo, tiuj estas la klara pruvo ke ili ne fidis je la Patro, sed ke ili fidis je la idoloj, je la malveraj diaĵoj kiuj, kiel mamono, trompas prometante kion ili ne povas doni kaj, kiuj, ne havante la kapablon transdoni vivon, komunikas nur morton.

Jesuo proponas alternativon al tiu ĉi sinteno kiu kaŭzas la pereon de la homo kaj la maljustecon en la socio. Kaj li invitas la homojn anstataŭigi la zorgon de la amasigo de la havaĵoj per la ĝoja malkovro de la donacemo (Pli feliĉe estas doni, ol

ricevi”, Agoj 20,35). Laŭ Jesuo oni vere posedas nur kion oni donacas. La vera riĉaĵo, tiu kiu restas por ĉiam kaj ne povas esti neniigita, konsistas el tio kion oni donacis, kaj la farita bono estas la ununura provizo kiun la homo alportas kun si enirante en la eternan vivon (Apok. 14,13).

Kion oni retenas tion oni ne posedas, sed ĝi posedas la homon, kiel instruas la epizodo pri la riĉulo, kiu rifuzis la inviton de Jesuo forlasi siajn havaĵojn ĉar “li havis multajn posedaĵojn” (Mt. 19,22). Li opiniis havi la riĉaĵojn, vere estis tiuj ĉi kiuj havis lin. Kaj pro tio li estis malĝoja. Kio devis doni al li ĝojon, male, kaŭzis al li ĉagrenon.

La invito de Jesuo estas enmeti en nian vivon kiel prioritatan valoron “Lian regnon kaj Lian justecon” (Mt. 6,33). Elekti la regnon signifas akcepti la programon de Jesuo kaj ŝanĝi la bazojn mem de la socio kaj proponi al ĝi alternativon. Temas pri rezigno pri la avido posedi kaj malkovri la ĝojon de la kundivido. Tiu ĉi estas la elekto de la regno, tiu kiu povas tute ŝanĝi la vivon de la homo kaj spertigi al li ke kiam oni vivas por la bono de la aliuloj, oni permesas al la Patro prizorgi la bonon de siaj filoj. Tiam, la angoro por la morgaŭo anstataŭiĝas per la profunda fido en la nun, spertante ke estos la morgaŭo kiu prizorgos sin mem, forĵetante de la vivo de la kredanto ĉiujn angorojn kaj malkvietojn kaj malfermante lin al fido ĉiam pli granda je la Patro.

Alberto Maggi